L: Mi ne povas esprimi min rilate la landon, ĉar mi vidis nur la ĉefurbon. Prago estas tute certe unu el la plej belaj urboj, kiujn mi iam vizitis. Kiam ĝi baniĝas en la sunradioj, ĝi prave povas esti nomata „Ora Prago”. La kultura vivo ŝajnas multflanka kaj tre interesa. La prezentoj de la Vendita Fianĉino kaj de la baletoj laŭ muziko de Chopin, Dvořák kaj Borodin estis absolute unuarangaj. Veraj memorindaj eventoj. Kiel mi jam diris, mia faka laboro estis streĉa, sed sukcesa kaj fruktodona. Mi multon lernis kaj mia ĝenerala impresoj estas, ke sur la kampo rilatanta al mia studo, konsiderinda progreso estas farita kompare kun la periodo antaŭ 1956. La renkontiĝo kun la esperantistaro de Ĉeĥoslovakio estis karega. La plenŝtopita salonego dum la vendreda prelego montris klare la forton de la esperantismo en Ĉeĥoslovakio kaj la kunveno de la junularo, bonege organizita, estis sur tre alta nivelo. Ambaŭ aranĝoj estas ne nur inspiraj, sed ankaŭ promesoplenaj por la estonteco de la Internacia Lingvo en Ĉeĥoslovakio. Mi kunportas plej belajn impresojn.

Z: Sinjoro prezidanto, ni havis la okazon informi vin pri la ideo „Esperanto en la Etero”, pri kiu skribis al ni nia aŭstria aŭskultanto samideano Rudi Bartosch kaj nia ĉeĥa amiko Milan Krtička. Ternas pri aplikado de Esperanto en la radioamatora komunikado kaj pri starigo de radioamatora stacio ĉe la Internaciaj Esperanto-Kongresoj.

L: Oni povas nur bonvenigi la uzon de Esperanto por radioamatoraj celoj kaj apogi la nunajn klopodojn por vastigi tiun ĉi uzon. Laŭ mia opinio estus bone, se la radioamatoroj uzantaj la internacian lingvon, fondus sian propran internacian organizaĵon, kiu povus poste aliĝi al UEA kiel kunlaboranta asocio. Tio tamen estas afero apartenanta sole al radioamatoroj, pri kiu ili mem decidu.

C: Estimata sinjoro prezidanto, ni tre dankas vin por la intervjuo nome de niaj aŭskultantoj kaj nome de Radio Praha. Ankoraŭ fine, antaŭ la adiaŭo, ni petas vin, ĉar estas fakte rara evento, ke prezidanto de UEA vizitas Pragon, ke vi diru kelke da personaj salutvortoj al la aŭskultantaro.

L: La tuta intervjuo estas iusence saluto al la aŭskultantaro. Mi havas nur mesaĝon pri grava punkto: interesigu ĝis maksimumo la kampanjon por kolektado de subriboj je la propono prezentota al Unuiĝintaj Nacioj.

Z: Karaj aŭskultantoj, mi intencas malkaŝi, ke ni faris fotojn en nia studio kun sinjoro prezidanto Lapenna. Ni volas, ke ankaŭ vi havu memoraĵon pri la vizito de la prezidanto de UEA en Praha.



51-a Universala Esperanto-Kongreso okazos en Budapeŝto ekde la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto ĉi-jara en la Domo de Sindikatoj de la Konstrulaboristoj, sub la alta protekto de Ödön Kisházi (kiŝhaazi), vicprezidento de la Hungara Popolrespubliko. En la Honora Komitato estas Prof. Bognár, prezidanto de la Instituto por Kulturaj Interligoj kun Eksterlando; L. Dezséri (dejeeri), ĝenerala Sekretario de la Landa Pac-

Konsilantaro, S. Geréb, Sekretariino de la Landa Konsilantaro de la Sindikatoj; K. Keszei (kesei), ĝen. Sekr. de la Konsilantaro de Sindikatoj en Budapeŝt; Dr. M. Korach, Membro de la Scienca Akademio, katedra profesoro en la Teknika Universitato; J. Molnár, Vicministro por Kulturaj Aferoj; K. Rödönyi (rödönji), vicministro por Trafiko kaj Poŝto, ĉefdirektoro de la Hungaraj Stataj Fervojoj (MÁV); D-ro I. Sarlós (ŝarlooŝ), ĉefurbestro de Budapeŝt.

La dua oficiala bulteno konsistas el 20-paĝa broŝuro (kun tri diverskoloraj aldonoj-mendiloj) kaj entenas la foton de la kongresejo, ĝeneralajn informojn por la veturontoj en Hungarion, pri la abunda provizora programo kaj multnombraj fakaj kunvenoj, pri Internacia Arta Festivalo, oficialaj aranĝoj, ekskursoj, infana kongreseto, kongreso de blindaj esperantistoj, Belartaj Konkursoj, oratora konkurso, 5-a Internacia Fotokonkurso kaj pri la ekspoziciejo en la Kulturdomo de la Unuiĝinta Elektra Maŝinfabrika. Patronoj de la ekspozicio estas Julio Baghy kaj D-ro Kolomano Kalocsay, membroj de la Akademio de Esperanto kaj G. G. Pompilio, konstanta kongresa sekretario.

Por studintoj de la ekonomiaj altlernejoj!

Dum mia vojaĝo tra Japanujo turnis sin al mi: Teruiti Watanabe, emerita profesoro de la nacia Universitato en Jokohama kaj de la regiona Universitato en Gakuin, Baba-T 230, Tsurumi-K, JOKOHAMA Japanujo, kun la deziro korespondi kun iu el Ĉeĥoslovakujo pri la organizo kaj studo en niaj ekonomiaj altlernejoj. Teruiti Watanabe studas la organizon de la ekonomiaj altlernejoj en diversaj landoj. Oni povas korespondi kun li en Esperanto aŭ angla lingvo.

Vlasta Obručová
Čajkovského 52, Olomouc 5.

PACO, n-ro 148, marto 1966 — Ĉeĥoslovaka eldono, 40-paĝa. La kajero estas lukse ekipita kun riĉa varia enhavo kaj bonega lingvaĵo. Kvankam temas pri Ĉeĥoslovaka eldono, la enhavo estas fakte internacia; la leganto trovas en ĝi krom la pripacaj artikoloj, verkitaĵoj de elstaraj mondaj verkistoj, ankaŭ tiujn el la literatura, arta, muzika, teknika kaj aliaj sferoj. Ne mankas eĉ angulo amuza kaj „Korespondi deziras". La revuo entenas ankaŭ interesajn informojn el la Esperanto-movadoj — nia kaj eksterlanda.

La jus aperinta revuo PACO estas vere digna reprezentanto de Mondpaca Esperantista Movado — ĝi estas elokventa heroldo de noblaj porpacaj kaj progresemaj ideoj de tiu ĉi plensignifa tutmonda institucio, en kies sino devus esti ĉiu pacama esperantisto.

Tomba

ĈU VI ESTAS JAM ADEPTO DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO?

Se ne, aliĝu tuj de la landa sekcio de MEM (en la kadro de ĈSEK). En Ĉeĥoslovakio direktu vin al: Tomáš Balda, gvidanto de MEM-sekcio Řevnice 416/23, Praha západ, aŭ al: Administracio de PACO Esperanto-Rondeto ĉe ZK-ROH ZVIL V. Bořánek, Kopeckého sady 13, Plzeň.

Jarkotizo Kĉs 20.—; la kotizo inkluzivas la abonon al la revuo PACO, aperanta ĉiumonate en diversaj landoj.

Ĉu vi forgesis? Kiel ni jam informis, E-rondeto ĉe ZK Ostroj, Na rybníčku, Opava, petis dissendati la broŝuretojn pri Petr Bezruč al viaj korespondantoj, de kiuj vi estis petontaj salutlerojn al „Památník P. Bezruč“ en Opava kaj opiniojn pri la broŝureto aŭ sciigon, kion oni scias pri la Silezia poeto. E-rondeto intencas eldoni la kompletan tradukon de „Sileziaj kantoj“, sed nur tiam, se nun estos sufiĉe forta resonado el eksterlando. Espereble vi faris vian eblon por helpi al ĉi tiu certe utila agado. Se vi dezirus pluajn ekz., skribu al Památník P. Bezruč, Ostrožná ul. Opava. Bonvolu sendi libervolan donacon pere de la almetita poŝtpagilo por la elspezoj kun la presigo kaj dissendado de la broŝureto.

NEZAMEŜKAJTE POSLEDNÝ TERMÍN

Podpisová akcia UEA (petícia Organizácii spojených národov v prospech esperanta) sa končí 31. 7. 1966. Je teda eĉe ĉas na d'alsie usilovné zbieranie podpisov hlavne individuálnych. Ďalšie tlačivá si môžete vyžiadať od hl. delegáta UEA (Jar. Šustr, Dlouhá 10, Praha 1). Nemeŝkajte!

Mad'arský rozhlas vysielá denne esperantsky! Od februára t. r. vysielá Budapeŝt' pravidelný 15-minútový program v esperante na vlnách 240 m, 41.6 a 48.1 m., o 20.30 hod. stredoeurópskeho ĉasu. Vysielanie má trvať do svet. esp. kongresu resp. do prvého augustového týždňa. Tak začínala i Varŝava — ĉi Peŝt nebudu nasledovati jeŝ príklad a nebudu vysielati trvale? To bude istote záviseti i od záujmu a povzbudzovani zo strany esperantistov!

DISKUTKONTRIBUAĴO DE LA REDAKTORO

Mi kore dankas al la estraro de Junulara Aktivo por la permeso alparoli vin. Mi estos tre konciza en mia parolo. Temas pri kelkaj aferoj. Eble vi scias, ke kune kun samideanino Jana Cíhová ni estas la aŭtoroj de la ununura Esperanto-elsendo de Radio Praha. Se vi deziras, ni volonte diros al vi la elsendotempon kaj ondolongon. Estus bone, se vi en via perletera internacia kontakto eluzus la okazon konatigi viajn gemikojn pri niaj programoj, ĉar — la eĥo je la elsendoj estas tre grava por ni, kaj mi eĉ povas diri, de ĝi dependas, ĉe tia specialigita programo, ĝia ekzistado. Ni ĝojas, ke la junularo lastatempe manifestis pli grandan aktivecon en sia movado kaj post interparolo kun la estraro de Junulara Sekcio de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato ni atendas pli vigan liveradon de raportaĵoj kaj kontribuaĵoj pri viaj agado, laboro, planoj kaj vivo. La intereso de niaj aŭskultantoj ne sole pri la Esperanto-movado sed ankaŭ pri nia tuta sociordo kaj vivo estas eksterkutime granda. Kvankam niaj Esperanto-programoj estas elsendataj en la kadro de la eksterlanda disaŭdigo por Aŭstrio, skribas al ni aŭskultantoj jam el 20 landoj. En siaj leteroj konfesas al ni siajn impresojn, proponojn kaj spertojn. Surbaze de la leteroj ni poste kompilas niajn programojn. Fine de mia parolo mi volus informi vin pri ideo el la vico da proponoj. Temas pri aplikado de Esperanto en la radioamatora trafiko, pri kiu skribis al mi nia aŭstria aŭskultanto Rudi Bartosch. Ĝenerale la lingvo de la radioamatoroj tutmonde

estas la angla. Temas pri tio: montri, ke la Lingvo internacia estas la plej konvena eĉ por tiu ĉi celo. Al tiu ĉi ideo ligas sin alia: starigi radioamatoran esperantistan stacion ĉe la internaciaj Esperanto-Kongresoj, kiel ekzemple ĉi-jare en Budapeŝto. Lastatempe en kelkaj landoj kaj ankaŭ en Ĉeĥoslovakio kreiĝas tuta reto da radioamatoroj esperantistoj. En Hradec Králové estas ekzemple samideano Milan Krtička, en Praha mi mem, en Aŭstrio laboras nia Rudi Bartosch. La ideo „Esperanto en la Etero" jam antaŭenmarŝas. La junularo, progreso, tekniko kaj Esperanto iamaniere kune koheras. Se vi volos, via partopreno sur tiu ĉi kampo estas bonvena.

František Zajíček

ŜARĜO DE KVIN JARMILOJ

Sub tiu titolo en la revuo POST- en Vaŝingtono aperis artikolo de Stanley Karnow pri la nuntempa vojo de Hindujo. Post priskribo de la senespera nutraĵ-situacio en la unua tempo de regado de Ŝâstri, oni pritraktas pluan krizon, tre interesan ankaŭ por esperantistoj. Ni citas tiun parton de la artikolo laŭvorte el la magazino „100+1 zahraniční zajímavosti" n-ro 14, paĝo 27.

„Kvankam tre grava, la nutraĵ-krizo kompare al aliaj tumultoj, senkvietigaj por Ŝâstrî fine de januaro, estis ankoraŭ relative malsovaĝa. La malpaco eksplodis pro la delikata problemo de tutŝtata lingvo. Komuna lingvo estas vere tute necesa por la ŝtata integreco, sed en Hindujo oni parolas 14 ĉefajn lingvojn kaj proksimume mil dialektojn. Supernacia lingvo estas la angla, kiun tamen regas perfekte nur tre malmultaj. Ŝâstrî disaŭdigas siajn proklamojn al la popolo anglalingve kaj poste ripetas ilin hindie. En la hinda parlamento la delegitoj portas aŭdilojn kaj aŭskultas unu la aliajn pere de simultana interpret-instalaĵo; ĉirkaŭ cent leĝodonantoj, kies dialektoj estas tro malfacile tradukeblaj, devas siajn paroladojn prezenti unu tagon antaŭe.

Laŭ originala plano oni supozis, ke 15 jarojn post la proklamo de sendependeco, do en januaro 1965, la hindia lingvo parolata de 40 % de loĝantoj en la nordaj distriktoj, fariĝos tutŝtata. Ĝis tiu tempo la ceteraj hindoj estis ellernontaj la novan lingvon. Tamen nur tre malmultaj estis ĝin vere lernintaj. Kiam proksimiĝis la limtempo, la oficistoj kaj studentoj, ĉefe en la dravida sudo, ektimis, ke ili perdos la postenon aŭ malsukcesos ĉe la ekzamenoj pro nescio de la hindia. Ŝâstri ne klopadis dispeli tiun timon, kaj la incendio ekflamis de eta fajrero.

Unu tagon en la suda urbo Madras disvastiĝis sciigo, ke la poŝto enkondukas pagil-formularon kun hindia teksto. Post kelke da horoj tra la urbostratoj fluis procesioj de studentoj kriante: „Pereu la hindia imperiismo!" Post kelke da tagoj ekflamis la tuta sudo. Popolamasoj bruligadis vagonarojn, renversis aŭtobusojn, prirabis la registarajn domojn. Almenaŭ kvin opoziciuloj proteste mortigis sin mem, tri el ili sin mortbruligis laŭ ekzemplo de la vjetnamaj budhistoj. La polico mortigis pluan centon da ili kaj 1500 de la demonstraciintoj arestis.

Ŝâstri, kiel kutime, klopodis al „ĝenerala interkonsento" en sia registaro; sed la regiona patriotismo de liaj ministroj nur pligrandigis la streĉitecon. Meze de februaro dum kelkaj krizaj momentoj la registaro de Ŝâstri balanciĝis sur rando de abismo. Tamen Ŝâstri faris nenion. Li timis, ke koncesioj al la sudo incitegus la hindiajn

fanatikulojn norde. Memkompreneble, finfine li devis ion fari. Sub premo de la publika opinio li alpaŝis la mikrofonon, por disaŭdigi — angle — ke oni al neniu trudos ian fremdan hindian lingvon en la buŝon. La sudaj studentoj iom post iom kvietiĝis, almenaŭ ĝis tie denove ekflamos aliaj tumultoj, kio nepre okazos.

Fx.

MI ALPORTIS SALUTOJN KAJ APLAŬDOJN DE 25 POPOLOJ AL LA ĈEĤOSLOVAKAJ ESPERANTISTOJ

Mi havis la feliĉon partopreni la 50-an Universalan Kongreson en Tokio. Verdire: nur ĝian lastan tagon, ĉar la vojaĝpermeson mi ricevis iom malfrue, do ne estis eble certigi lokon por mi en aviadiloj, en vagonaro nek en la ŝipo. La letero en Japanujon iras 8 tagojn, do mi ne sciis, ĉu estas prudente vojaĝi, sed la sopiro ĉeesti en Tokio fine venkis. Mi ja volis al la 50-a UK prezenti mian proponon! . . .

La japana ambasado ekde la unua momento efike helpis al mi. Kiam evidentiĝis, ke mia vojaĝo ne estas precize preparita, oni donis al mi leteron en japanaj lingvo kaj skribo. Do mi sentis min jam pli trankvila kaj ekveturis la 26-an de julio per aviadilo el Prago al Moskvo.

Mi atingis bonŝance per aviadilo ankaŭ Ĥabarovsk, kie mi trovis homojn komprenemajn kaj komplezajn. La duan tagon mi forvojaĝis per rapidvagonaro al Naĥodka. Prizorginte en la haveno la pasportajn formalajojn mi ekvidis ĉe unu vojaĝanto la verdan stelon. Nature mi ekkriis pro ĝojo. Ankaŭ la viro ekĝojis. Li estis Tibor Sekelj el Jugoslavio. Li estis malbonŝanca, ĉar lia aviadilo pro malbona vetero ne atingis ĝustatempe la antaŭan ŝipon. do li kun siaj amikoj — esperantistoj (unu el Jugoslavio, dua el Japanio), restis unu semajnon en Naĥodka.

Post du tagoj, per ŝipo tra la Pacifika Oceano ni atingis Jokohamon, kaj mi estis surprizita, ĉar atendis min ses japanaj, junaj, zorgemaj samideanoj. Ekde tiu momento mi sentis min en Japanio kiel hejme.

Ni forveturis per taksio al Tokio, kie mi adiaŭis al Tibor Sekelj kaj al tiuj, kiuj volis ĉeesti la kongresan balon. Nepovante el mia poŝmono pagi hotelon, mi devis pluveturi kun miaj amikoj al la urbo Ucnomija, situanta 200 km de Tokio.

La lastan tagon de la Kongreso ĉeestis proksimume 1600 esperantistoj el 46 landoj sed la programo estis tiel precize fiksita, ke mi jam ne povis prezenti mian proponon. Tamen Tibor Sekelj ricevis permeson prelegi, dum eksterordinara kunveno, pri vastigado de Esperanto kaj li envicigis ankaŭ mian proponon pri ĝia utiligo dum Olimpiaj Ludoj en Meksikio 1968... Poste mi konatiĝis kun la dua ĉeĥa partoprenanto de la Kongreso, s-ano Fiala, kiu montris al mi glumarkon por propagando de Esperanto ĉe la OL en Meksikio. Bedaŭrinde li ne povis rememori, de kiu li ĝin ricevis. Tamen ne estas grave, kiu la unua eldiris la proponon, sed ke ĝi efektiviĝu! Vi certe jam legis en niaj ĵurnaloj (Ĉs. sport, kaj Mladá fronta el 28. 12. 65), ke la samideanoj en Meksikio jam prezentis la proponon al la Internacia Olimpia Komitato.

Post la fino de UK miaj japanaj amikoj preparis programon por mia tuta 13-taga restado en Japanio, do mi povis viziti la fame konatan nacian naturrezervejon, la Nikko-parkon kun historiaj memoraĵoj, sed ankaŭ kun signoj de la nuntempaj japanaj tekniko kaj organizo.

La urbo Ucnomija havas 200 000 loĝantojn kaj la E-klubo anojn precipe el la urba universitato. La ĉi-tiea E-klubo proponis amikecon al la urbo Olomouc kaj jam multaj klubanoj de ambaŭ urboj interkorespondas.

El Ucnomija mi forveturis al Hamamacu-ŝi. Kun pola samideano Wolczyk mi gastis ĉe esperantistoj en la universitato de la urbo Ŝizuoka, kiuj preparis por ni en la loka E-klubo belan vesperon. La duan tagon ni vespermanĝis kun ili ĉe la margolfo (supo el konkoj!), sciante jam bone uzi la japanajn manĝo-bastonetojn, kaj kantis Esperantajn kantojn kaj rigardis la lumigitajn pontojn de insulo al insulo kun nokta trafiko de superekspresaj vagonaroj kaj aŭtomobiloj.

La sekvan tagon du japanaj amikoj kunvojaĝis kun mi ĝis Nagoja kaj poste mi sola daŭrigis ĝis Kameoka por partopreni kulturalan festivalon. Ĉi tiu memstara veturo estis mia plej granda sukceso en Japanio. (Neniu ĉe ni povas havi ĝustan imagon pri la japana fervojtrafiko. Bonvolu imagi, ke nur tra unu tokia stacidomo dum unu tago traveturas 700 000 da vojaĝantoj!)

La Oomoto-movado preparis por 800 partoprenantoj el 26 landoj belegajn travivaĵojn. Oni prezentis al ni malnovajn japanaj kutimojn, teo-ceremonion, No-dramon (No-dancojn), kostumojn, folklorajn dancojn sub nokta ĉielo, Uta-festojn, sed ankaŭ modernan baleton. Romantika rapidflua ekskurso laŭ la Hozu-rivero finis la tritagan festivalon.

Al ĉiuj ĉeestintoj certe por ĉiam restos en la memoro ne nur la grandega bankedo kun tiom da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, ke ne estis eble ĉiujn eĉ nur gustumi, sed antaŭ ĉio la festa bonvenigo. Tuj post mia alveno en Kameoka-n, kvankam mi ne estis antaŭe avizita, oni hisis la Ĉeĥoslovakajn flagon. Per sincera aplaŭdo salutis ĉiuj ĉeestantoj el 25 popoloj la Ĉeĥoslovakajn samideanojn kaj mi transdonas la salutojn kaj aplaŭdojn al vi!

Post la fino de la festivalo mi restis kun kelkaj samideanoj du tagojn inter la Oomotanoj kiel gasto. Ili zorgis pri ni tre kompleze kaj montris al ni en la montaro la Ajabé-vilaĝon, kie la Oomoto-movado estiĝis. Mi vizitis ankaŭ Kjoto-n, la plej belan historian urbon de Japanio.

Multaj japanaj esperantistoj petis saluti siajn amikojn en Ĉeĥoslovakio, sed ne estis eble ĉiujn memori. En Japanio Esperanto havas multe da sindonaj adeptoj.

Vlasta Obručová

**Pripojenou zloženkou prosíme poukázat předplatně Kčs 12,—
Ďakujeme!**



Esperanta Foto-Film-informa Servo, kultura, propaganda, redakcia servo de Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kino-Magnetofonamatoroj (kunlaboranta fak-asocio de UEA) serĉas por sia kultura kaj arta programoj seriozajn kunlaborantojn, aktivulojn en la tuta mondo.

Sub la titolo „Esperantujo 1966” ni deziras organizi kulturen kaj artan festivalon dum la 51-a UEK en Budapeŝto. Ĝi okazos verŝajne en la moderna klubejo de Napsugár (Sunradio), Kultura kaj Arta Esperanto-klubo de Hungara Esperanto-Asocio.

Ni petas ĉiujn gemembrojn de ILEF-movado kaj ĉiujn esperantistajn foto-kino kaj magnetofon-amatorojn de la mondo, bonvolu amase partopreni la organizan laboron, kaj bonvolu sendi al ni konsilojn, proponojn, fotoraportojn pril la Esperantaj eventoj, aranĝoj k. s. La mezuro de la fotoj estu 9 X12 cm.

La sendaĵojn ni petas adresi al: Esperanta Foto-film-informa Servo de ILEF-movado, BUDAPEST P. O. 119, Poŝtfako 6, Hungario.

Verda Film-strio. Multobligita gazeto de Asocio Tutmonda de Filmo-Foto-Amatoroj. Redaktas: Irena Fink, P. O. Box 32 Mount Waverley, Victoria AŬSTRALIO. (4 pĝ, 21 X 34 cm, aperas laŭbezone, jara abono 4 internaciaj respond-kuponoj).

Fotografado kaj filmado fariĝis „hobio” de tiom granda parto de la homaro, ke ĝi meritis propran internacian revuon, kies ĝermo La Verda Film-strio ŝajne penas fariĝi. Ni deziras al ĝi multe da sukceso, sed se ĝi vere volas evolui, ĝi devus alkonformiĝi sian formaton al la internacia. Fx.

14. LETNÍ E-TÁBOR, LANČOV

Kursy esperanta, branné prvky, sportovní soutěže, koupání, společenské hry, výlety, humor, zpěv a vyprávění v dýmu táboráku mají ve svém programu Letní kursy esperanta u Stříbrné zátoky na Vranovské přehradě od 3. 7. do 30. 7. 1966 (prvý běh do 16. 7. a druhý od 17. 7.) Informace podává Klub esperantistů, Osvětový dům Bedřicha Václavka v Třebíči.

UZU ESPERANTON EN KOMERCO!

Kiel pasintjare, la Foiro de Barcelono ankaŭ nun eldonis sian oficialan afiŝon en la Internacia Lingvo. M. Andreu-Fontirroig, delegito por Informado kaj Propagando, esperas, ke kiel ĝis nun vi bonvolis kunlabori en la distribuado de la Esperantaj afiŝoj por elmontri en taŭgaj lokoj kiel ekz. turismaj oficejoj, vendejoj, stacidomaj haloj k. t. p. Li ege vin dankas pro viaj informoj rilate la rezulton de viaj klopodoj al jena adreso: Feria oficial e internacional de muestras en Barcelona (Foiro Barcelona, Propaganda Fako), Avenuo de María Cristina BARCELONA-4, Hispanio.

Iom da statistiko: partoprenantaj landoj — 56. Valoro de la elmontritaj varoj enlandaj 619 142 408 pesetoj, eksterlandaj 910 931 463 pes., de negocoj faritaj 2 231 423 189, kosto de la instalaĵoj 220 837 526. Nombro de la vizitintoj: 1 809 505.

(La propagandmaterialo konsistas el granda afiŝo, el starigebla kartono kaj el glumarkoj — la du antaŭaj ankaŭ kun verda stalo. La preciza multkolora preso estas belega). Iz

UZU ESPERANTON EN SCIENCA LABORO!

Botanika dardeno de Veterinara Fakultato de Universitato en Brno (Palackého 1-3, BRNO 12, ĈSSR) eldonis 24-paĝan broŝuron kun faldebla kovrilo, entenanta 770 nomojn laŭ latin- kaj nacilingvaj indikoj. Laŭ ĉi tiu indekso oni povas substreki la deziratajn numerojn de la koncernaj semoj sur la aldonita aparta mendilo.

Ni gratulas al s-ano D-ro Inĝ. J. Šikula, estro de la botanika ĝardeno kaj liaj kunlaborantoj, al ĉi tiuj gravaj sciencaj laboro kaj rezulto.

SZEGED — dekdupaĝa ilustrita gvidfolio tra tiu ĉi universitata urbo informas la partoprenintojn de Universala Kongreso en Budapeŝto vizitontajn la Festivalon (la 7-9-an de aŭgusto) pri riĉa programo por ili preparita (liberaera festludo, folkloro, muziko, vingustumado, rondveturo per aŭtobuso, ŝipekskurso sur rivero Tisza, Delikat-sablara strando ktp.). — La 10-20-an de aŭgusto 1966 okazos la internacia Pedagogia Esperanto-Seminario. Eblas turni sin al adresoj: Prepara Komitato de la Postkongresaj Tagoj, SZEGED, Vörösmart, y u. 71.; III. Internacia Pedagogia Esperanto-Seminario, Szeged, Aprilis 4 utja 1, Hungario.

Na ankete zahraniĉných spisovatel'ov — prekladatel'ov z ĉeskej a slov. literatúry, z príležitosti 20. výročia oslobodenia ĈSSR (revue Světová literatura 3-65) sa zúčastnil i známy japonský bohemista Kei Kurisu. V článku „Radosti a strasti japonského bohemistu“ zdôrazňuje, že medzi jeho spolupracovníkmi sú mnohí ĉeskí a slov. esp-isti a že vďaka esp-u nadviazal temer pred 20 rokmi kontakt s ĉeskou a slov. kultúrou. — Prekladatel'a a publicistu Kei Kurisu, ĉlena Svazu pokrokových japonských spisovatel'ov poznajú najmä pražskí esp-isti z jeho pobytu v Ĉeskoslovensku v rokoch 1959-61. O. Kn.

EL LA AGADO DE NIAJ RONDETOJ

Ĉeské Budějovice. En 1965 la E-ron- deto okazigis 41 kunvenojn, dum kiuj krom helpo al pli junaj membroj en korespondado, kaj perfektigado, oni tradukis la tekstojn por la prospekto okaze de 700-a datreveno de fondo de la urbo Budějovice. Pri GDR prelegis Ing. J. Kalný, pri Nova Teatro en Brno — Kalný, pri vizito en Francio — D. Hartlová, pri 50-a UK en Tokio — L. Fiala el Poděbrady, kaj estis projekciita filmo Fiat 850, diapozitivaj pri Domo de Svisa Transporto en Luzern (O. Hrubý), pri Tutŝtata konferenco en Olomouc (O. Hrubý). El eksterlando vizitis nin 3 esperantistoj kaj en eksterlando estis 2 anoj. — Je la gratulletero al s-ro Franz Jonas, okaze de lia elekto prezidento de Aŭstrio, ni ricevis personan dankleteron, en Esperanto. — Je iniciato de Inĝ. J. Kalný, Radio Ĉeské Budějovice okazigis programon pri Esperanto, la 30-an de jan. 1966. Ni sunkcese kunlaboris kun E-rondetoj en Poděbrady, Brno, Jihlava, Havlíčkův Brod kaj helpis al novaj rondetoj en Vyklantice kaj Liptovský Mikuláš. — La subskriba kampanjo rezultigis 1187 individuajn kaj 220 amasajn subskribojn. — La sudbohemia regiona gazeto „Jihočeská pravda“ aperigis la 25. 7. 1965 artikolon de O. Hrubý „Cesta k dorozumění“ (La vojo al interkompreniĝo), dediĉita al la Subskriba Kampanjo. — El

la planataj aranĝoj ni menciuj okazigon de regiona renkontiĝo de esperantistoj, ĝemeliĝon kun alilandaj E-kluboj kaj varbadon de partoprenontoj por internacia esperantista renkontiĝo en Zvikov-podhradí, post UK en Budapeŝto.

Liptovský Mikuláš. E-rondeto ĉe Muzeo de Janko Král' kunvenadas ĉiuvendrede je la 19-a horo en la 1-a etaĝo de la Muzeo. Ĝi helpadas al ges-anoj, vizitantoj la Muzeon kaj la mondfamajn stalaktitajn grotojn de Demänová, en Mezslovaka Regiono.

Žiar nad Hronom. E-rondeto ĉe UK de RSM „Partizán" kunvenadas ĉiulunde je la 18.30 h. kaj la estraro ĉiun lastan semajnon en la monato pritaksas la agadon. La rondeto okazigos kurson ankaŭ por la lokaj radioamatoroj, anoj de Svazarm. Krome ĝi planas publikan prelegon kun partopreno de eksterlanda lektoro. Ĝi daŭrigos la kompiladon de Slovaka-Esperanta Radioteknika Vortaro.

KORESPONDI DEZIRAS:

Jacuguki Jakeuĉi, 38-jara instruisto (li ŝatas librojn), Kamiikĝaŭa 34, HAMAMACU — ŝi, Japanio.

Ta Tara Etsuji, oficisto (interŝanĝas bildkartojn, Hatsuo — ĉo 1410 — 1, HAMAMACU — ŝi, Jap.

Toŝia Sahara, 20-jara teknikisto (kun fraŭlino), Hatsuo — cho 537, HAMAMACU — ŝi.

Motoharu Niŝio, 17-jara lernanto (iŝ. bildkartojn), 53 Terazima — ĉo, HAMAMACU —

F-ino Kaŭada Ŝigeko, 18-ja. studentino de pedagogia fako, Ichinosava — machi 258, UCUNOMIJA.

F-ino Ueno Joŝiko, 18-ja. st-ino, Mizuho — Co 279, Minemachi, UCUNOMIJA.

F-ino Mucuko Ogivara, 447 — I Nomijama — cho, KANUMA — ŝi, Tochigi — ken.

F-ino Toŝiko Ŝota, Makuta — cho 689 — 1, UCUNOMIJA.

F-ino Sumiko Hirose, Hutabaŝo 539 — 2, Minemachi, UCUNOMIJA.

F-ino Fumiko Huŝiki, Kami — akutsu 4, Ujiie — machi, Ŝioja — gun, Tochigiken.

Naojuki Uno, 18-ja. studento de agronomia fako,

Jasuo Tamahira, 18-ja. stud. de teknikafako,

Toŝiaki Taniguchi, 18-ja stud. de tekn.fako,

ĉiuj: Esperanto-klubo de Ucnomija Universitato, 350 Minemachi, UCUNOMIJA.

F-ino Noriko Sugiki, oficistino, 1429 Niŝikara — machi, UCUNOMIJA.

(Ĉi tiujn japanajn adresojn sendis al ni la 10-an de marto 1966 Vlasta Obruĉová, Ĉajkovského 52, Olomouc).

Mgr. Maria Krausowa, SOSNOWIEC Poŝtkesto 48, Pollando, serĉas por siaj 60 gelernantoj (liceanoj) multajn adresojn de junaj korespondemuloj.

S-ro Arne Bengtsson, 47-jara svedo, Abybergsgatan 32, M ö l n d a l, Svedio pri literaturo, arto, Esperanto-movado, naturo, psikologio, filozofio.

300 esperantistoj — membroj de la Vroclava Esperanto-klubo deziras korespondi kun la tuta mondo. Skribu amase al Pola Esperanto-Asocio, Str. Dubois 3, WROCLAW, Pollando.

Antonio Barasevich, arbaristo-teknikisto, kun arbaristo aŭ de simila profesio. Hösök tere 26, CSAKBERÉNY, Hungario.

Ranko Gavranovič, 22-jara studento de literaturo dez. iŝ. bildkartojn kun panoramoj aŭ popolkostumoj. Cvijičeva 84/a, BEOGRAD, Jugoslavio.

Sergej Grigorjev, 17-ja lernanto, Lenina 1, kv. 1, HMELNICKI, USSR, dez kor. pri filatelio, iŝ. pm, il. pk.

Fridrich Zöld, Ul. výstavby 1. KOŠICE, Ĉeĥoslovakio, volas korespondi letere kaj bildkarte, interŝanĝas insignojn kaj Esperantaĵojn.

47-jara svedo deziras korespondi pri literaturo, arto, Esperanto-movado, naturo, psikologio, filozofio ktp. Adreso: S-ro Arne Bengtson, Abybergsgatan 32, M ö l n d a l, Svedlando.

Ĉesko-esperantskou k o n v e r z a c i, příručku Vlad. Pražáka, liodlá vydat Stát. pedag. nakladatelství v Praze. Její těžiště bude v rozhovorech zpracovaných na běžná témata z denního života (hotel, cestování, nákupy, dotazy, informace apod.) Zvláště podrobně bude rozpracován oddíl dopisování, důležitý pro zájemce, kteří si chtějí dopisovat s esperantisty v zahraničí. Zvláštní kapitola bude věnována mluvnici esp., zejména tvoření slov. Příručka má mít 232 stran, formát A/6; vazba měkký plastik. Cena váz. výt. bude asi Kčs 13.— Abychom mohli stanovit potřebný náklad, zašlete svou objednávku již n y n í na adr.: Stát. pedag. nakl, n. p., odbytové odd., Praha 1, Ostrovní 30.

ZPRÁVY ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU — INFORMOJ DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO - KOMITATO. — Vydává — Eldonas: Osvětový ústav v Praze, Blanická 4, Praha 2. Rediguje — Redaktas: Dr. L' Izák — s redakčným výborom — kun la redakta komitato: J. Cichová, Inž. Ed. Felix, Red. O. Kníchal, M. Lukáš, Dr. T. Pumpr, Fr. Sviták, Ed. V. T_ varožek, J. Vondroušek. — Tisk — Preso: Tlačiarne Slov. nár. povstania, Martin. V-15*61269